

LA JUNIA VIVO



REDAKCIO KAJ
ADMINISTRADO:
WEST-GRAFTDIJK
IN.HJ NEDERLANDO
GIROMUMERO 209354 NEDERL.

JARABONO:
NEDERLANDO:
0,80 GULDENO
ALIAJ LANDOJ:
16 FR.FR.; 0,70 DOL.; 2,15V.FR.

F. HEYDAN

MONATA ORGANO POR LA JUNULARO KAJ KOMENCANTOJ

Por progresintoj.

LETEROJ EL LA MALLIBEREJO.

Breslaŭ, meze en decembro 1917.

...Ho, mi travivis ion tre dolorigan; sur la interna korto, kie mi rajtas promeni, ofte alvenas armeaj veturiloj, plenŝarĝitaj per sakoj aŭ malnovaj manteloj kaj ĉemizoj de soldatoj, ofte sangomakulitaj; oni deprenas la ŝarĝon kaj dividas ĝin inter la ĉeloj, kie la vestoj estas flikataj; kaj poste ili estas resendataj al la armeo.

Antaŭ nelonge alvenis tia veturilo tirata de bubaloj anstataŭ ĉevaloj. Estis la unua fojo, ke mi vidis tiujn bestojn de proksime. Ili estas pli fortaj kaj pli larĝaj ol niaj bovoj; ili havas platan kapon kaj malantaŭen kreskintajn kornojn, do kranion, kiu estas pli simila al tiuj de niaj ŝafoj, tute nigra kun grandaj, afablaj okuloj. Ili devenas el Rumanio kaj estas militakiraĵo. La soldatoj, kiuj venis kun la veturiloj, rakontis, ke estis tre malfacile kapti ĉi tiujn sovaĝajn bestojn kaj ankoraŭ pli malfacile ekuzi ilin antaŭ la veturiloj, ĉar ili kutimis esti liberaj. Oni terure bategas ilin, ankaŭ por ili validas la „ve al la venkitoj”. Sole en Breslaŭ, onidire, estas centoj da ili; la bestoj, kiuj kutimis al la freŝa rumana herbejo, ricevas mizeran kaj malmultan nutraĵon. Oni senkompate ekspluatas ilin por la transporto de ĉiaj ŝarĝoj kaj ili baldaŭ mortas. Antaŭ kelkaj tagoj do alvenis tia veturilo kun sakoj. La ŝarĝo estis tiom granda, ke la bubaloj ne povis tiri ĝin trans la sojlon de la pordego. La soldato, kiu akompanis, tiom brute komencis bategi, ilin per la tenilo de sia vipo, ke la inspektorino indigne demandis al li, ĉu li do ne sentas kompaton al tiuj bestoj! „Al ni, homoj,

ankaŭ neniu sentas kompaton," li respondis kun malica grimaco kaj ankoraŭ pli sovaĝe li ekbatis...

Fine la bestoj sukcesis, sed unu sangis... La haŭto de bubalo estas laŭ la proverbo dika kaj fortika, sed tiu ĉi estis ŝirita. Dum la malŝarĝado la bestoj staris senmove kaj lace kaj tiu, el kiu fluis la sango, rigardis antaŭ si kun esprimo sur la nigra vizaĝo kaj en la dolĉaj okuloj kiel de ĝis laco plorinta infano. Estis precize la esprimo de infano, kiun oni severe punis, kaj ĝi ne scias pro kio, kial, ne scias, kiel forkuri de la doloro kaj la kruelaj batoj... Mi staris proksime kaj la besto alrigardis min; larmoj falis el miaj okuloj — larmoj pro tiu besto; pli maldolĉe oni ne povas plori pro plej kara frato al mi pro ĉi tiu silenta ĉagreno. Kiom malproksimaj, kiom neatingeblaj la freŝaj, verdaj herbejoj de Rumanio! Tute alie la suno tie brilas, la vento blovas, tutaliaj la kantoj de la birdoj kaj la sonoraj voĉoj de la paŝtistoj. Kaj ĉi tie — la fremda, mizera urbo, la sufoka stalo, la abomena malfreŝa fojno miksitita kun duonputra pajlo, la fremdaj teruraj homoj, kaj la batoj, la sango fluanta el la freŝa vundo... Ho, mia malfeliĉa bubalo, mia malfeliĉa frato, ni ambaŭ staras tiom senpovaj kaj mutaj kaj estas unu en doloro, senpoveco kaj sopiro.

Intertempe la malliberuloj okupis sin pri la veturilo, deprenis la pezajn sakojn kaj portis ilin internen; sed la soldato enpoŝigis la manojn, promenis grandpaŝe tien kaj reen, ridetis kaj fajfis stratmelodion. Kaj la tutan belegan militon mi vidis image...

2-5-17.

...Kontraŭe, ankaŭ en la naturo mi trovas tiom da krueleco, ke daŭre min turmentas tio. Jen malgranda okazintaĵo, kiu sin kroĉis en mia animo. Pasintan printempon mi foje venis hejmen tra mia kvietaj, senhoma strato, kiam mi subite ekvidis sur la tero malhelan makulon. Mi klinis min kaj vidis silentan dramon; granda skarabo kuŝis senhelpe sur la dorso kun la piedoj supren, baraktante kontraŭ granda aro de formikoj, kiuj ĝin viva formanĝis! Mi tremis pro abomeno, prenis mian poŝtukon kaj komencis forpeli la bestetojn. Sed ili estis tiom obstinaj kaj impertinentaj, ke mi devis longe batali kontraŭ ili kaj kiam fine la malfeliĉa martiro estis libera kaj mi estis metinta ĝin je granda distanco sur la herbon, ĉiuj ĝiaj piedoj estis formorditaj... Mi iris hejmen kun la dolora sento, ke finfine mia bonfaro al ĝi estis tre duba...

20 julio, 1917.

...Hieraŭ, ĉirkaŭ la naŭa, mi vidis ion tre belan. Mi rimarkis de sur mia divano flaman rebrilon, iom ruĝkoloran, sur la fenestro-vitro, kiu altiris mian atenton, ĉar la ĉielo estis tutgriza. Mi iris al la fenestro kaj ensorĉita haltis. Sur la senfina, griza ĉielamaso aperis en la oriento granda nuboj. Ĝi havis tian supertere rozan koloron, kaj estis tia aparta mirindaĵo, ke ĝi ŝajnis rideto, saluto el nekonata malproksimo. Profunde mi ĝemis kaj etendis la manojn al tiu sorĉa belo. Tiom longe kiom ekzistas ankoraŭ tiaj koloraj kaj formoj, la vivo estas bela kaj vivinda, ĉu ne? Miaj okuloj restis sur tiu monto el lumo kaj englutis ĉiun rozoruĝan radion, ĝis kiam mi subite ekridis pri mi mem...

15-1-17.

...Ĉu vi memoras, kion mi volas fari post la milito? Kune vojaĝi al la Sudo. Kaj certe ni faros! Mi scias, ke vi revas pri vojaĝo kun mi al Italio, la plej alta celo por vi. Sed mi intencas kunpreni vin al Korsika. Ĝi eĉ superas Italion. Tie oni forgesas Eŭropon, almenaŭ la modernan Eŭropon. Imagu vastan imponan pejzaĝon kun severaj konturoj de montoj kaj valoj, supre estas nur nudaj rokoj el bela griza ŝtono, malsupre olivoj, laŭroberoj kaj maljunegaj kaŝtanoj. Kaj super ĉio regas prahistoria silento — neniu homa voĉo, neniu birda krio, nur ie plaŭdetas rivereto inter ŝtonoj kaj supre fajfas preter rokorandoj la vento — ankoraŭ la sama, kiu ŝveligis la velojn de Odysseus. Kaj la homoj renkontataj harmonias kun la pejzaĝo. Aperas ekzemple subite de post kurbo en la montvojeteto iu karavano — la korsikanoj ĉiam iras unu post alia, ne grupe kiel niaj kamparanoj. Antaŭe iras hundo, post ĝi venas kaprino aŭ azeno ŝarĝita per sakoj da kaŝtanoj, post ĝi paŝas ganda mulo, sur kiu sidas virino, infano sur la brakoj. Ŝi sidas en alta teniĝo, svelta kiel cipreso; senmove; akompanas ilin per kvietaj, certaj paŝoj barbohava viro; ambaŭ silentas. Oni povus ĵuri, ke ili estas la Sankta familio. Kaj tiajn scenojn oni vidas en ĉiu momento. Mi estis ĉiufoje tiom forte impresita, ke, senintence, mi volis fari genuflekson. Al tio mi iam emas antaŭ perfekta beleco. Tie vivas ankoraŭ la biblio kaj la klasikoj. Ni vizitu ĝin kiel mi faris; piede tra la tuta insulo, ĉiunokte dormante en alia loko, ĉiun sunleviĝon salutante dum promenado. Ĉu logas vin? Al mi tre plaĉus konigi ĉi tiun mondon al vi...

Meze en novembro, 1917.

...Miaj lastaj vortoj memorigas min pri io alia, io rimarkinda, kion mi volas rakonti al vi, ĉar tio ŝajnis al mi tre poezia kaj kortuŝa. En scienca verko mi legis antaŭ nelonge pri la birdomigrado, al ni ankoraŭ nesolvita enigmo, ke diversaj specoj da birdoj, kiuj kutime persekutas unuj la aliajn, kune kaj pace faras la grandan vojaĝon trans la maron al la sudo. En Egiptio alvenas vintre grandegaj svarmoj da birdoj, kiuj ŝvebas kiel nuboj en la aero kaj mallumigas la ĉielon. Kaj meze en la svarmoj inter la rabobirdoj : akcipitroj, falkoj, agloj, strigoj, flugas miloj da malgrandaj kantbirdoj, ekzemple alaŭdoj, najtingaloj, regoloj; ili estas sen timo por la rabobirdoj, kiuj en alia tempo ilin persekutas. Dum tiu migrado regas provizora paco; ĉiuj birdoj deziras atingi komunan celon kaj ili falas duonmortaj pro elĉerpiĝo sur la bordojn de Nilo. Poste ili disiras laŭ la specoj kaj la landoj de deveno. Kaj pli mirige : oni rimarkis, ke dum tiuj migradoj trans la granda akvo la grandaj birdoj ofte kunportas sur la dorso multajn malgrandajn : oni vidis arojn da preterflugantaj grupoj, sur kies dorso malgrandaj migrobirdoj sidis gaje pepantaj! Ĉu tio ne estas tre ĉarma?

Trad. VANE.

ALVOKO AL LABORO.

(Laŭ nekonata aŭtoro)

- | | |
|--|---|
| 1. Jam tagiĝas, kamarado!
Do, rapidu al labor'!
Malfacila laborado
Vokas nin al paca glor'. | 2. Jen per kapo, jen per mano,
Jen per flama arda vort'
Agu, kara samcelano,
Agu vigle ĝis la mort'. |
| 3. Ne supozu, ke la mondo
Longe miskomprenos nin,
Kredu : nia paca rondo
Venkos barojn ĝis la fin'. | 4. Nur laboru, de laciĝu
Sur la kampo de l' batal',
Paca semo maturiĝu
Por homara ideal'. |

El : G. Giedra : „Violetoj”.

(Estas konsilinde deklami la simplajn versojn en grupkunvenoj).

Dum la lasta semajno, kiam la rubriko por Tervuren jam estis preta, anoncis sin pli ol 60 partoprenontoj. Entute jam estas pli ol 100. Nur T.J.O.-anoj rajtas partopreni.

LA JUNA VIVO EN „LA JUNA VIVO”.

Francino rakontas pri la alveno en Groet (aŭg. 1938).

Finfine. Schoorl!! Bela urbeto en la nordo de N. Holando. Ni baldaŭ atingos la celon de nia vojaĝo. Ankoraŭ 3 kilometrojn, kaj jen ni estas en Groet, malgranda vilaĝo, ĉe la piedo de la dunoj.

Groet!... Flirtas la esperanto-flago. Jen la fino de nia belega veturo tra Nederlando. — Sur la mallarĝa vojo, laŭiranta verdajn herbejojn..., flugantaro de blondaj infanoj, hele vestitaj, akceptas nin : „Jen la francinoj!” — Haltas la aŭtobusoj kaj ni rapide eliras. Ĝojaj geknaboj baldaŭ metas pakaĵojn, kovrilojn flanke de la vojo. — Returniras la aŭtobusoj... suna kaj libera estas la vojo antaŭ ni! Vivu Esperanto! — Ĉar kelkajn metrojn antaŭ mi, mi vidas mian nederlandan korespondanton. Mi rekonas lin per fotoj, kiujn li jam sendis al mi. Apogante sur sia alta biciklo li okule serĉas min — kaj nun li bone ridetas, li ankaŭ rekonas min... Etendante la manon ni antaŭeniras. „Bonan tagon!”... Emocio, ĉar estas la unua fojo, ke mi esperante devas paroli... Ĝojo, ni interkomprenas, kaj ŝajnas al mi, ke ni jam depost tre longa tempo interkonatiĝis... Ni ĝoje antaŭen iras ĝis la beleta domo, kiun la nederlandaninoj aliformigis en dormejo... Jam al mi alvenas la geamikoj de mia nederlanda „frato”, interŝanĝo de fortaj manpremoj, salutoj, ridetoj, frataj paroloj... Gefratoj ili jam estas en mia koro : Nel, la pura kaj afabla nederlandano, Cor, Louw, Gerbrand, kaj la aliaj. Neniam antaŭe ĝis tiu tago mi sentis, kio estas la sincera amikeco... kaj dum la tagoj, kiuj sekvis, mi lernis, kio estas la juna entuziasmo kaj la pura ĝojo... dank’ al nia kara Esperanto!...

Aniche (Franc.).

P. D.

... Preskaŭ ĉiujn muzikaĵojn el la „Juna Vivo”-kantaro mi scias parkere. Kiam mi nun kantas aŭ mandolinludas ilin, preskaŭ la larmoj fluas... Amuziĝu vi ĉiuj multe, dum mi restas tie ĉi, malgaje pensante pri... Groet.

El letero de portugala amiko (13-8-38).

Kia ajn la Hodiaŭo estu, la Morgaŭo apartenos al la Paco.

Victor Hugo.

... Al la junaj komencantoj kaj progresintoj, al ĉiuj, kies junaj koroj enhavas iom da varmo, kiuj ekkomprenas, ke la vivo havas celon, kiun la homoj devas atingi, al ili mi diras : „Karaj junaj amikoj en ĉiu mondparto, ni montru iel al niaj senlacaĵoj semantoj, ke iliaj penoj por la plibonigo de nia estonto ne estos vanaj.

Ne atendu la dudekkvinan jaron por ekagi, ĉar tiam jam estos tro malfrue, kaj vi suferos, kaj pentos, jes vi pentos vian nunan inerton! Ni junularo, kiu naskiĝis en la jarcento de la rapideco, de la prosperoj, ni havas bazon kaj vastajn kampojn, sur kiuj ni povas labori por nia estonto. Tiu bazo estas la Zamenhofa idealo, kaj la vastaj kampoj, la Esperanto-organizoj. Aliĝu senprokraste al tiuj organizoj. Abonu kaj legu tian Esperanto-gazeton, kiu plej bone sin adaptas al vi. Legu Esperanto-literaturon kiel eble plej multe!

(Hispanio), nov. 1936.

J. E. C.

Ĉiutage oni legas en la ĵurnaloj pri militoj kaj preparoj por militoj; pere de la radio en ĉiujn domojn venas novaĵoj pri luktoj inter homoj kaj homoj; oni povus pensi ke nur tiuj aferoj prenas la unuan lokon en la vivo de la popoloj. „En iu lando la homoj pensas pri la homoj en alia lando kiel bestoj kiuj babilaĉas iun nekompreneblan lingvon, kaj ĉiam deziras mortbati aliajn. Do oni preparas la mortigilojn por malebligi ke aliaj mortigu”. Tiel oni povus pensi, rigardante la teron de alia planedo, sed ĉu tio estas la vero? Certe ne. En „La Juna Vivo” aperas leteroj de gejunuloj el multaj landoj, kiuj esprimas iliajn sentojn kaj esperojn. Ĉu ili temas pri milito? Neniam. Ili temas nur pri tiu homamo pro kiu iu viro pasigis multajn longajn jarojn, evoluante lingvon, per kiu ĉiuj popoloj povus interkompreniĝi kaj ami unu la alian. Estas bonege, ke la leteroj de la junaj homoj estas skribitaj en tiu universala lingvo. Pere de la lingvo ili komprenas la homamon; ili transpasas la barajn murojn.

Leighton-Buzzard (Ang.).

J. W. H.

Mi tre ĝojas vidi en la februara N^o de „L. J.V.”, ke vi aranĝos en Anglujo ekzamenon pri originalaj verkaĵoj de junaj geknaboj! Mi petas, sendu la venontan „J. V.” al Anglujo tiel rapide kiel eble, ĉar mi ja deziras ĉeesti la Internacian Junularkunvenon!

Via samideana,

Crayford (Ang.).

Douglas C. BILLS.

Por komencantoj.**Regnestro kiel fiŝo.**

„Ĉu vi scias,” demandis Konfuzio al Tesia, „kiel devas esti regnestro kiel regnestro?”

„Sen akvo mortas fiŝo,” respondis Tesia, „sed sen fiŝo akvo tamen restas akvo.”

„Jen vi trafas!” diris Konfuzio.

Ĉino rabis oron.

Iam estis ĉino, kiu volis oron. Frue en mateno li iris al urbo en decaj vestoj kaj kun ĉapelo. Li iris al or-vendisto, rabis lian oron kaj forkuris.

Oficisto kaptis lin kaj demandis : „Kiel vi kuraĝis rabi alies oron, kiam ĉeestis homoj?”

„Dum mi prenis la oron,” respondis la viro, „mi vidis nur la oron, ne la homojn!”

El „Voĉoj el Oriento”.

(Ĉinio).

Mortis milionulo. En la luksa funebra procesio iris viro en tre mizeraj vestoj. La malriĉulo ploregis.

„Ĉu ankaŭ vi apartenas al la parencoj?” mire demandis preterpasanto.

La viro respondis : „Mis ĝuste ploras pro tio, ke mi ne estas parenco.”

Respondu al jenaj demandoj :

Ĉu mortis riĉa viro? Ĉu la procesio estis luksa? Ĉu marŝis en la procesio nur riĉaj homoj? Kiel aspektis unu viro? Kion li faris? Kion demandis preteriranto al li? Ĉu la malriĉa viro ploris, ĉar li estis parenco? Kial li ploris?

Tri musoj.

Iu princo vidis foje en sonĝo tri musojn : unu grasan, alian malgrasan kaj la trian, blindan.

Maltrankvila pri la signifo de tiu stranga sonĝo, li venigis diveniston, rakontis al li la sonĝon kaj petis klarigon.

„Via princa moŝto,” respondis la divenisto, „la sonĝo ne estas tre malklara. Vi vidis en sonĝo la staton de la aferoj en via regno. La grasa muso estas viaj ministroj. La malgrasa estas via popolo, kaj la blinda — tio estas via princa moŝto mem.”

La azeno de Nastradin.

Nastradin estas la nomo de la turka, nacia ruzulo, pri kiu ekzistas multaj anekdotoj. Jen estas unu el ili :

Iun tagon najbaro vizitis lin, kaj pruntepetis lian azenon, por alporti lignon el la arbaro.

Nastradin ne deziris servi al la najbaro, pro tio li mensogis, ke la azeno ne estas hejme, sed sur la kampo. En la sama momento tamen la azeno ekblekis en la stalo.

La najbaro diris : „Jen, ĝi estas en la stalo. Kial vi asertis, ke ĝi forestas?”

Nastradin indigne respondis : „Al kiu vi ja pli kredas — al mi aŭ al la azeno?”

Respondu al jenaj demandoj :

Kiu estas Nastradin? Kie li loĝis? Ĉu Nastradin estis ruza? Kion oni rakontas pri li? Kion Nastradin posedis? Kiu venis al li? Kion la najbaro deziris? Por kio li bezonis la azenon? Ĉu Nastradin deziris helpi la najbaron? Kion li diris? Ĉu li parolis la veron? Ĉu la najbaro kredis lin? Kio okazis en la stalo? Kion diris la najbaro? Kiel respondis Nastradin? Kion li diris?

La konscienco.

Juĝisto : „Se via konscienco estas tiel nigra, kiel via barbo, vi estas kompatinda.”

Kulpulo : „Se oni komparus la konsciencon kun la barbo, vi tute ne havus konsciencon, via moŝto.”

Infana kompreno.

Oni sonorigas.

La kvar-jara Vilĉjo malfermas la pordon. Mire li rigardas la kolektanton, kiu havas ujon en la mano. La sinjoro demandas al la knabeto, ĉu lia patrino estas hejme. Al tia etulo li ne povas peti monon.

Vilĉjo, reiras al la ĉambro, kaj diras :

„Panjo, estas sinjoro, kun ŝparuĵo por vi!”

„Diru, amiko, ĉu vi volas tagmanĝi kun mi?”

„Jes, volonte!”

„Tiam telefonu al via edzino, ke ŝi preparu por unu persono pli!”

Interesa songo.

Ĉirkaŭ la tablo la botista familio sidis, kaj matenmanĝis. La lernanto, kutime manĝante tre rapide, hodiaŭ estis meditema. La mastro demandis lin pri la kaŭzo de lia revado, kaj la lernanto rediris, ke li havis strangan songon dum la nokto. La botisto aŭdis tre volonte rakonti songojn, kaj tial li petis la junulon, ke li sciigu ĝin al li. La lernanto nun parolis : „Ni ambaŭ, vi kaj mi, estis en bareloj, kiuj staris unu apud la alia. Vi demandis min : „Bubo, kio estas en via barelo?” Mi respondis : „En mia barelo estas peĉo, kaj kio estas en via?” Vi diris : „En mia barelo estas mielo”. Nun la mastro interrompis la lernanton kaj parolis : „Estas via feliĉo, ke mi sidis en la mielo, kaj vi en la peĉo. Se estus alie certe mi batus vin!”

La lernanto ridis, kaj diris : „Mia rakonto ankoraŭ ne finiĝis. Ni eliris el la bareloj kaj purigis unu la alian per lekado!”

Tasko :

1. Kopiu kaj traduku ĉiujn rakontojn en la rubriko „Por Komencantoj”.
2. Lerne parkere : „Regnestro kiel fiŝo”, „Ĉino rabis oron”, „Malavarulo”, „La konscienco”, „Infana kompreno”.
3. Rakontu per propraj vortoj la enhavon de : „Tri musoj” kaj de „Interesa songo”.

LULKANTO.

Okuletojn — du steletojn —	Rondiranta lun' aŭskultos
Fermu, karulin'.	Kanton kaj al vi,
Vian songon anĝeleta	Tra fenestro malavare
Gardos. Voku lin.	Lumon verŝos ĝi.
Oraj bukloj, orflugiloj,	Kaj en songo vi ridetos
Vesto el arĝent'...	Per ĉeriza buŝ',
Li per voĉo dolĉe sona	Al la Brust' premante forte
Kantos en silent'.	Urson el la pluŝ'.

Bonan nokton! Vin matene
 Vekos koka kri'.
 Dormu! Vian songon gardos
 Lun', anĝel' kaj mi.

Ludmila JEVSEJEVA.

Jen kelkaj tre simplaj ezercoj por tiuj, kiuj nur mallonge studis esperanton:

1. En la ĉambro.

En la mezo staras tablo kaj kvar seĝoj. La seĝoj estas brunaj. Sur la tablo estas bela tapiŝo. En la muroj estas tri fenestroj. Antaŭ la fenestroj staras floroj. Ili estas ruĝaj, flavaj kaj bluaj. En la varma ĉambro sidas la familio. La patro sidas apud la forno kun la gazeto kaj legas. La patrino kudras. Karlo, la filo, kaj Anjo, la filino, studas.

Kio estas en la mezo de la ĉambro? Kiaj estas la seĝoj? Kio estas sur la tablo? Kia estas la tapiŝo? Kio estas en la muroj? Kie staras la floroj? Kiaj estas la floroj? Kia estas la ĉambro? Kie sidas la familio? Kiu sidas apud la forno? Kion li faras? Ĉu la patrino kudras? Kiu studas?

2. Holanda vintro.

La neĝo kaj la glacio estas for. La stratoj estas malsekaj kaj malpuraj. En la kanaloj estas multa akvo pro la pluvoj. La altaj botoj de la infanoj estas nun utilaj. La ŝtrumpoj restas sekaj. Malmultaj homoj nun promenas. Ili restas en la domoj. Kie restis la blanka neĝo? Ĝi degelis. Ankaŭ la glacio degelis. La holanda vintra vetero estas tre malkonstanta. Multaj homoj estas malsanaj pro la malbona vetero. Ili restas en la lito kaj ne laboras. Dum multaj tagoj la suno ne brilas. Ho jes, ĝi brilas, sed malantaŭ la nuboj! La griza, nebula vetero ne plaĉas al la homoj.

Kiaj estas la stratoj? Kio estas en la kanaloj? Ĉu la botoj de la infanoj estas utilaj? Ĉu multaj homoj promenas? Kie ili restas? Ĉu multaj homoj promenas? Kie ili restas? Ĉu ankoraŭ estas neĝo? Kie ĝi restis? Kia estas la holanda vintra vetero? Kial multaj homoj estas malsanaj? Ĉu ili laboras? Kie brilas la suno dum la nebula vetero? Ĉu la griza vetero plaĉas al la homoj?

Laŭtlege kelkfoje la lecionojn, antaŭ ol vi respondas al la demandoj!

LA KURSOJ FINIĜAS, nun la lernantoj bezonas legomaterialon! La binitaj jarkolektoj de „La Juna Vivo” enhavas abundon de ĝi! Profitu la malaltajn prezojn : Jark. '34-'35 : 0,55 guld.; jark. '35-'36 kaj '36-'37 : po 0,45 guld. Ĉe mendo de almenaŭ 10 ekz. la prezoj estas nur : 0,40 guld. kaj 0,35 guld. (plus afranko).



INTERNACIA JUNULARKUNVENO

TUTMONDA JUNULARORGANIZO.

Tervuren (7-14 aŭgusto).

Kvar bildoj ornamas ĉi tiun rubrikon. Kvar bildoj, kiuj atestas pri la beleco de la vilaĝo Tervuren. La kastelo de Robiano, kiu en la malnova tempo apartenis al iu grafo, nun estas ripozdomo por malfortaj infanoj. Ankaŭ la dua konstruaĵo, la farmo de Termunt, parolas pri la gloro de Tervuren en la



Lupo strato.

dekseca jarcento. En la nuna tempo la famo altiras multajn artistojn. La aliaj bildoj, la Lupostrato kaj la Hubertus Kapelo, donas agrablan impreson pri Tervuren.

Kondiĉoj por la konkurso en Anglio.

1. Ĉiuj gejunuloj inter 10-18 jaroj povas ensendi verkaĵojn.
2. Ĉiuj verkaĵoj estu skribitaj en Esperanto.
3. La temo de la verkaĵoj estas libera, laŭ la plaĉo de la kandidatoj.
4. Ĉiuj verkaĵoj estu ricevitaj antaŭ 1 junio 1939.

La ezamenkomitato, kiu juĝos la verkaĵojn, konsistos al : S.ino E. v. Veenendaal-Bouwes (red.ino „La Juna Vivo”), S.ro P. Kryt (prezidanto T.J.O.), S.ro F. Meydam (sekretario T.J.O.), S.ro J. Holland (angla peranto de T.J.O.). Adreso por verkaĵoj : S.ro J. Holland, 61, Vandyke Rd, Leighton-Buzzard, Beds (Anglujo). Petu antaŭe ĉe via peranto cirkuleron kaj plenigilon.

Dua listo da partoprenontoj :

Nederlandaj junuloj : 21. Lauw Schouten, St. Maartensbrug; 22. Joost Lyk, Dorpstr. 89, Breskens; 23. G. Raes, Ponte E 15, Yzendyke.

Anglaj junuloj : 24-29, sub gvidado de S.ro Barnecutt, Birmingham.

Anglaj junulinoj : Verŝajne venos 10 anglaj knabinoj el Birmingham.

Francaj junulinoj : 40. Paulette Dubois, Aniche; 41. Marcelle Montagnon, par Nans-sous, Ste Anne, Doubs; 42. Edinée Montagnon, St. Ferjeux, Besançon (Doubs).

Ĝenera'aj sciigoj : La vizitantoj, kiuj deziras loĝi en hoteloj turnu sin al : S.ro Leenheer, Voorzitter Vereeniging Vreemdelingenverkeer (V.V.V.), Brusselschestraat 36, Tervuren, Belgujo.



Kastelo de Robiano.

Petu al : „Vereeniging van Vreemdelingen Verkeer” en Tervuren, kaj
ankaŭ al : „Office de Tourisme belgo-luxembourgeois”, Bruselo, esperanto-
prospektojn.



Korto de Termunt.

Bonvolu baldaŭ anonci vin por plifaciligi la taskon de la organiza komitato.

Jam kelkfoje eksterlandaj abonantoj demandis al mi, ĉu la junulartendejo en Arnheмо kaj la Internacia Junularkunveno estas organizataj de la sama organizo. **Tute ne.**

La junulartendejon en Arnheмо aranĝas la fed. de lab. esp.-istoj en la ned. regiono. La kunvenon en Tervuren aranĝas „Tutmonda Junular-Organizo”.



S. Hubertus Kapelo.

komunikoj

Tutmonda Junularorganizo.

Adresoj :

Sekretario : S.ro F. Meydam, Lingestraat 11, Leerdam, Ned.

Kasisto : M. v. d. Horst, Johan Idastr. 32, Rotterdam. Ĝiro 330139.

Filmservo : S.ro Schut, Koedijk (N.H.). Ĝiro 310334.

Por Anglujo : J. W. Holland, 61 Vandyke Rd., Leighton-Buzzard, Beds.

Perantoj : En lokoj, kie ne estas peranto, kaj iu estas preta kaj kapabla por tiu funkcio, li (ŝi) anoncu sin al la sekretario.

Donacoj : Limington-lernejo, Anglujo : 2 guld.; F.ino N. Birmingham (Anglujo) : 0.60 guld.; F.ino K., Laren (Ned.) : 1 gld.; S.ro E. H., Turku (Finl.) : 0,45 guld. L. W. en Bussum (Ned.) : 0,30 guld. Por la filmservo : S.ro K. en Amsterdamo : 2,50 guld.



LA JUNA VIVO VOJAĜO

VOJAĜO AL SVISIO (23 Julio—6 Aŭgusto).

La lastjara vojaĝo al Svisio lasis ne-forviŝeblan impreson en la memoro. Multfoje la pensoj vagadas al la imponaj montoj, la ĉarmaj lagoj, la silentaj arbaroj.

Pro tio ni denove projektis planon pri vojaĝo tien. Nunjare ni kompreneble vizitos alian regionon ol la antaŭan jaron.

La centro de nia nova vojaĝo estos Zurich. Ni tendumos kelkajn kilometrojn sude de tiu urbo, tuj ĉe la lago. De tie ni faros diversajn ekskursojn.

Jen la tuta programo :

23-24 julio : Amsterdam-Eindhoven-Liège-Luxembourg-Metz-Nacy-Busang. Ni do traveturos la belajn Aredenojn kaj la Vasgojn.

25 julio : Promenado kaj grimado en la ĉirkaŭaĵo de Busang.

26 julio : Al la Zuriha Lago.

27 julio : Al la pinto de Utli-monto.

28 julio : Ekskursoj al Wallen-lago, unu el la plej imponaj lagoj de Svisio. La montoj sin levas rekte el la lago ĝis alteco de 2300 metroj.

29 julio : Al Bern, la belega ĉefurbo de Svisio.

30 julio : Al Zug kaj la Zug-monto.

31 julio : Vizito al la tre interesa ekspozicio en Zurich kaj al la Unuiĝfestoj (Bundesfest).

1 aŭgusto : Al la Rijn akvo-falo ĉe Schaffhausen.

2 aŭgusto : Libera mateno. Posttagmezo al Zurich por butikoj.

3-4-5 aŭgusto : Veturado al Tervuren, apud Bruselo. Posttagmezo kaj vespere de la 5-a de aŭg. vizito al Bruselo .

6 aŭgusto : Hejmvojaĝo.

Kondiĉoj : La partoprenantoj pagas 43 guldenojn. Por tiu sumo ili ricevas : 1. Sidlokon en komforta aŭtobuso; 2. Ĉiujn manĝojn. — La sumo ankaŭ enhavas la vojaĝimposton en Francio. La vojaĝantoj komune preparos la manĝaĵojn kaj la teon. Dekfoje ni tagmanĝos en modesta restoracio.

La organizanto pretas zorgi pri tendo por tiuj personoj, kiuj ne posedas propran. Por dormloko oni pagas 3 guldenojn.

Ni vojaĝos per kolektiva pasporto. La partoprenantoj bezonas nur ateston pri nederlandaneco.


Pliajn informojn volonte havigos la redakcio.

Anoncu vin baldaŭ, por certigi al vi sidlokon en la aŭtobuso.

(La leganto komprenas, ke la vojaĝo al Chamonix, anoncita en la Februara numero, ne okazos.)

Ne forĵetu la malnovajn ekzemplerojn de la „La Juna Vivo“! Donu ilin al viaj geamikoj, kaj provu varbi novajn abonantojn!

ENIGMOJ



Horizontale : 1. Kion T. J. O. celas organizi(-n); 7. Sufikso; 8. Du samaj vokaloj; 11. Nea vorto; 13. Mambesto; 14. Delikata agraodoro(rad.); 16. Granda cervo (rad); 17. Artikolo; 18. Prefikso; 19. Griza besto kun longa vosto (rad.); 20. Finiĝo de verbo; 21. Kiel 7 horizontale; 22. Kion ni la antaŭan jaron vidis en Groet (-nn).

Verkikale : 1. Monato; 2. Verda besteto; 3. Laktaĵo; 4. Kia estas T.J.O. (rad.); 5. Mambesto, kiu flugas vespere (rad.); 6. Kiuj partoprenas en junularkunvenoj; 9. Noktbirdo (rad.); 10. Kion ni faras por forigi la polvon; 12. Persona pronomo; 15. Kion ni faras por kunkolekti la fojnon (rad.).

Koedijk (Ned.).

Jo GEUS.

Inter la ĝustaj solvintoj ni lotumos 2 premiojn. Ni akceptos solvojn ĝis 1 majo 1939.

LA SOLVO EL No 7.

Kolo — kolero; suko — sukero; veto — vetero; lito — litero; tubo — tubero; morto — mortero; galo — galero;


La premiojn gajnis : S.ro Chasseriaud, Royan (Francujo) kaj S.ino Luyting-Vos van Zon, Zd. Scharwoude (Ned.).



RICEVITAJ ESPERANTAJOJ

JARLIBRO de la Lingva Komitato kaj de ĝia Akademio. 43-paĝa libreto, enhavanta raportojn pri la pasinta jaro, de la prezidanto de la Lingva Komitato kaj de la direktoroj de la diversaj sekcioj; nomaron kaj adresaron de L.K.-anoj; L.K.-anojn laŭ la lingvoj kaj ilia elirjaro; Akademion; Mallongan historion de la Lingvaj Institucioj! Normigitajn naciajn diplomojn. Oostduinlaan 43, Hago (Nederlando).

PATROJ KAJ FILOJ de I. S. Turgenjev, trad. K. Bein (KABE). Formato 14 × 21 cm.; 216 paĝoj. Prezo : Broŝ. : 35 fr. fr.; bind. : 45 fr. fr. (inkluzive afranko). Eld. SAT, 67 avenue Gambetta, Parizo (Franc.). Nederlandanoj povas mendii la libron nur ĉe FLE, Libro-Servo, Postbus 4050, Amsterdamo,



KORESPONDADRESOJ

Ĉiu abonanto aŭ grupo havas la rajton enpresigi unufoje en jaro senpagan korespondadreson, ne pli grandan ol du linioj.

Hungarujo : Kun junuloj el diversaj landoj dez. koresp. „Skolta Esp. Rondo”. Budapest V, Nagy Sandor-U 6.

Polujo : Kahlaŭ Franciszek, Bydgoszcz, Sienkiewicza 14, dez. kor. interŝ. poŝtm. kaj il. poŝtk. kun malproksimaj landoj. Resp. certa.

Nederlando : Komencantoj 10-13 jaraj dez. kor. per il. poŝtk. kun ekster-eŭropaj landoj. Esp. Rondo „Nia Ĝojo”, K. Laffertu, Wildervank.

Polujo : M. Milvergev, 17-j. gimnaziano, Warszawa I, uz. Mila 5m3, dez. kor. k. ekstereŭropaj landoj. Antaŭe sendu foton. Resp. certa.

Finnlando : S.ro Aappo Kurikka, Petäjärvi, dez. artajn ĵurnalojn, afiŝojn, bildojn, glumarkojn, de ĉ. l. Sendos il. gaz., naciajn kaj esp., k. a.

Nederlando : P. Uvenhoven 15-j. knabo, Zwaanstr. 13, Haarlem, serĉas knabon en Belgujo por kune pasigi la somerferion.

Francujo : Lucien Laplace (23-j.), 40 rue aux Juifs, Argentan (Orne), dez. korespondi kun eksterlandanoj.

Nederlando : S. J. Knip (23-jara), Middengeestweg 2, Bergen (N.H.), dez. korespondi kaj interŝanĝi poŝtmarkojn kun ĉiuj landoj.

Nederlando : 14-35-jaraj gelernantoj serĉas gekorespondantojn en la tuta mondo. Skribu al F.ino A. Vos, Burgerbrug, Zype. Ni certe respondos.

Nederlando : La Esp. Grupo en Julianadorp dez. korespondantojn en ĉ. l. Resp. certa. S.ro R. Koster, Langevliet 78, Julianadorp (N.H.).

Nederlando : Serĉas por siaj 65 lernantoj (12-40 j.), korespondantojn en la tuta mondo, S.ro T. Blokland, 't Zand (N.H.).

Anglujo : 12-13-j. knabinoj dez. kor. kun gejunuloj en la tuta mondo. Tinkers Farm Lernejo, Northfield, Birmingham.

Francujo : S.ro B. Dussart, 67 rue Wilson, Somain (Nord) serĉas por 60 knabinoj (11-13-j.) samaĝajn gekorespondantojn en ĉ. l. Koresp. nur grupe. Ĉiu infano metu leteron en komunan koverton, kiun sendos la gvidan(in)o. Respondo sammaniera.

Estonio : Esp. Fakoj de Uenŭto, Lembitu, strato 20, Tallin, serĉas kontakton kun gejunularaj societoj kaj unuigoj en ĉiuj landoj.

Polujo : 25-j. laboristo dez. kor. kun ĉiuj landoj per il. poŝtk. kaj let. Certe resp. Karlo Sarganek, Poruba Orłwska 194, Slask-Zachodni.

Nederlando : F.ino E. Leeuw, Hout-Blerick 135 (L.), dez. kor. kun ĉiuj mondpartoj. Resp. certa. Ankaŭ interŝ. ilustritajn kartojn.

Nederlando : Kiu sendos el sia lando materialon, farita de infanoj (desegnaĵoj, instru-leglibretoj, segaĵoj, kudraĵoj, dancoj, muziko, teatraĵetoj, informoj pri kutimoj kaj ludoj) por montri al gepatroj k. instrui al infangvidantoj, aŭ sendos kvanton da eksterl. poŝtm. por dividi inter miaj lernantoj, ricevos rekompence laŭdezire ion samvaloran. W. Borsje, Multatulistraat 29, Rotterdam (W.).

Jugoslavujo : F. Cikoviĉ, Tanaska Rajiĉa 33, Kragujevac, dez. interŝ. poŝtmarkojn el la tuta mondo. Sendu 50 aŭ pli. Respondo certa.

Francujo : S.ro A. Contart, lernejestro, Loos-en-Gochelle, Pas-de-Calais, serĉas gekor. en la t. m. por 25 10-18-j. gelernantoj. Kor. grupe.

Francujo : Esp. grupo (8 pers. 14-18 j.) serĉas gekoresp. por kolektiva koresp. Esp. Grupo Balodrome, Marchiennes, Nord.

Nederlando : Kelkaj geamikoj 13-18-jaraj dez. kor. kun geamikoj en la tuta mondo. Resp. certa. Nel Tromp, Oterlekerweg D 64, Stompvoren.

ANONCETOJ.

VIZITU LA XI-an NEDERLANDAN ESP.-KONGRESON de la Ned. Esp. Asocio „LA ESTONTO ESTAS NIA”, okazonta en Rotterdam (Zoologia Ĝardeno), 8-9-10-a de aprilo 1939.

Jen la programo. — Sabaton : Je la 16a : Oficiala malfermo de la kongreso. Je la 20-a : interkonatiĝa vespero kaj balo.

Dimanĉon : Je la 10-a : Jarkunveno de LEEN; je la 13-a : Komuna lunĉo; je la 14-a : Daŭrigo jarkunveno; je la 15-a : Ekskurso al la muzeo Boymans; je la 16.30-a : Relegia kunveno; je la 18-a : Oficiala bankedo; je la 20-a : Granda revuo kaj balo.

Lundo : Je la 10 1/4 a. : Ŝipekskursoj je la 12 1/2-a : Komuna lunĉo en Maaspavilono en Vlaardingen; je la 14 1/2-a : Adiaŭa teo kaj dancado en societo „Parkzicht”, Rotterdam; je la 17-a : Oficiala fermo de la kongreso.

Petu informojn al : S.ro C. Baksteen, sekr. L. K. K., Willem Buytenwechstraat 1225c, Rotterdam.

STATISKO DE I. E. L. PRI 1938.

Internacia Esp. Ligo ĵus publikigis statistikon pri sia membraro. En la fino de la jaro 1938 estis 13040. En la fino de la jaro 1937 estis 13487.

Jam pli ol 1000 abonantoj! Multe da teksto por malmulte da mono! Sur kooperativa bazo. Abonprezo por 12 numeroj fl. 1,50. 12 resp. kup. Petu senpagan specimenon ĉe : Red. „La Granda Familio”, Groesbeek, apud Nimego (Nederlando).

XXIa MONDKONGRESO DE KATOLIKAJ ESPERANTISTOJ, en Antwerpen, 5-10 aŭg. 1939. Kongreskotizoj : Kompleta kongreskarto kosta ĝis aprilo 40 fr. (guld. 2,40), poste 60 fr. (guld. 3,60). Ĉiajn informojn volonte donos la kongresinformisto : C. v. Hoogstraten, Grimbergen (B), Belgujo.

SKRIBA KURSO POR A KAJ B (nur por holandlingvanoj). Tre detala B-kurso. Gvidanto S. Aarse. Petu senpagan prospekton. Ĉiu kandidato sukcesis. „La Verda Stelo”, Weesperzijde 3, p/a. Nieveld, Amsterdam.

„LA JUNA VIVO”, INTERNACIA KANTARO EN ĈIUJ GRUPOJ. Enhavo : 34 kantoj kun muziknotoj. Prezo nur po 35 c.; 2 ekz., por 0,50 guld. (afr.).

„VIVO DE ZAMENHOF”, Edmond Privat (dua eldono). — Granda nombro da bildoj sur kreta papero. Fama verko de fama aŭtoro. Stilo de antingita nun de alia verkisto, lego de iu ajn paĝo alportas plej altan ĝuon al ĉiu lingvoscianto. Resume : Fiero de nia literaturo.

Prezo : bind. guld. 1,75; broŝ. 1,25 guld.